

## **KUNVOKILO al la Jarkunsido, la 1-an de majo 2021**

Jarkunsidon ni kunvokas sabaton, la 1-an de majo 2021 inter la 14a00 kaj la 17a00. Ĝi okazos rete, per aŭd-vida seanco partoprenebla el via hejmo (kelkaj homoj estos el Greziljono). Vidu la teĥnikajn detalojn sur la lasta paĝo.

La voĉdonoj okazos rete (per la retejo [balotilo.org](http://balotilo.org)). Societano, kiu ne povas aŭ ne volas voĉdoni per la retejo balotilo.org, bonvolu sendi sian voĉdonilon perpoŝte aŭ retmesaĝe. Vidu la lastan paĝon.

### **Tagordo**

- 1) elekto de la prezidanto kaj sekretario de la kunsido,
- 2) nombrado de la ĉeestantoj,
- 3) evoluo de la nombro de la societanoj, kontrolo de la kvorumo,
- 4) agadraporto 2020,
- 5) financa raporto 2020, aprobo de la kontoj de la jaro 2020,
- 6) imputo de la profito 2020,
- 7) buĝeto 2021,
- 8) kvitigo de la Komitato,
- 9) rezulto de la voĉdonoj,
- 10) sansituacio kaj programo de la venontaj monatoj - staĝoj, luoj...
- 11) nunaj konstrulaboroj kaj projekto tegmento (pruntado por finrenovigi la tegmenton de la kastelo),
- 12) komiso pri komerca evoluigo : serĉado de nova klientaro luanta la kastelon dum labortagoj,
- 13) prizorgado kaj plibeligo de la parko: herbo, plantoj, arbroj, natur-arto, forcejoj...
- 14) peto de nia najbaro aĉeti la vojon, kiu apartenas al ni kaj limas lian terenon,
- 15) aliaj demandoj.

### **3) Evoluo de la nombro de societanoj**

La 31-an de decembro 2020, enkalkulinte novajn societanojn, forpasojn, donacojn de societaj partoj, perdon de societanecon se oni ne donis vivsignon dum tri jaroj, restis 248 societanoj kun 852 societaj partoj A (po 16 €). Entute 553 societaj partoj B (po 200 €) estis akiritaj. Dum la jaro 2020, aliĝis 15 novaj societanoj, 8 societanoj donacis siajn societajn partojn, 1 societano estis forigita (sed reakiris societanecon se ŝi aŭ li petos). 11 societanoj aĉetis 46 societajn partojn B.

### **4) Agadraporto**

Dum la jaro 2020 ja ĝenis la sansituacio, kiu devigis nin nuligi staĝojn kaj multajn luojn, sed la konsekvencoj estis limigitaj, ĉar ni tamen plenumis duonon de nia kutima agado. Multaj el niaj elspezoj dependas de nia agado kaj sekve reduktiĝis, ni ricevis ŝtatan helpon kaj ni profitis la situacion por akceli la renovigajn laborojn, kiujn ni realigas de kelkaj jaroj, kaj ankaŭ la plibeligo de la bieno.

La jaron 2020 markis ankaŭ la ĉeesto de Catherine Kremer kiel deĵorantino en la kastelo. Dum la ludonoj kaj la staĝoj prizorgis la kastelon 6 administrantoj kaj aliaj societanoj. La kuiradon prizorgis Thierry Charles. La purigadon prizorgis Véronique Koalal.

En la jaro 2020, la kastelo estis okupata dum 207 tagoj, t.e. 57% de la tempo: 41 tagoj de staĝoj, 28 tagoj de ludonoj, 130 tagoj de konstrulaboroj kaj 7 tagoj por la jarkunveno, komitatkunveno kaj aliaj kunvenoj surloke aŭ telefone. Tiuj ĉi kunvenoj okazis ĉefe rete, tamen, enkalkulante la konstrulaborajn semajnfinojn, inter la komenco de februaro kaj la komenco de decembro, inkluzivante la trudizoliĝajn periodojn, dum 31 el la 46 semajnfinoj la kastelo estis okupita (vidu la aktivecon rete sub: [gresillon.org/a2020](http://gresillon.org/a2020)).

Pro la koronaviruso, dum la periodoj de izoliĝo kaj de malcerta sansituacio, nuliĝis pluraj staĝoj (Printempas, Interkant, Jarfino) kaj 20 ludonoj (BEMI, FESTO...). Ni sukcese alfrontis tiun situacion. Por la somero ni redaktis kaj aplikis sanprotokolon, kiu ebligis uzi la lokojn plensekure. Ni venigis 10 luprenantojn kaj uzis la liberajn periodojn por pli multe labori en la kastelo kaj la bieno.

Al la 10-a staĝo PRINTEMPaS aliĝis 30 homoj antaŭ la unua trudizoliĝo. Anstataŭ PRINTEMPaS, niaj instruantoj okazigis retan kurson: PRK (Printempa Reta Kursaro) kun 46 partoprenantoj el 8 landoj de la 17-a ĝis 19-a de aprilo. La kursojn organizis kaj gvidis Christophe Chazarein kun Marion Quenut, Przemek Wierzbowski, Szilva Szabolcs kaj Tim Morley. Ni ricevis parton de la enspezoj.

**La someraj staĝoj** okazis dum 5 tagoj fine de julio kaj 21 tagoj en aŭgusto, entute 26 tagoj.

La 1-a Verda Naturisma Semajno okazis de la 27-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto kun 20 esperantistoj kaj membroj de la franca naturisma federacio, kun la celo organizi pli grandan eventon en posta jaro.

La Verdaj Skoltoj kun 17 junuloj tendumis en Greziljono de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto.

La 6-a semajno de reciprokaj interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj, de la 3-a ĝis la 14-a de aŭgusto, kiun kune organizis Elisabeth Barbay, Brigitte Ardon, Catherine Kremer kaj Bert Schumann, kunvenigis 45 membrojn de SEL, JEU kaj RERS. Samtempe, la 4-a maratona Esperanto-kurso, kun Paweł Fischer-Kotowski kaj Jean-Luc Kristos kiel instruistoj, akceptis 13 lernantojn. Por la 32-a Internacia E-Konferenco (IEK post OSIEK) de la 10-a ĝis 14-a de aŭgusto aldoniĝis 7 kromaj gastoj. Entute ĉeestis 92 diversaj personoj, tamen nur 38 litoj estis okupataj, ĉar tendumis 17 skoltoj kaj 28 aliaj homoj.

La 10-an festan semajnon por infanoj kaj familioj, de la 16-a ĝis la 24-a de aŭgusto, kun Bert Schumann kiel staĝestro, Jean-Luc Kristos, Nicky Janssen, Anne Tilmont, Larisa Osadčuk, Alain Delmotte kaj Xavier Godivier kiel instruantoj kaj animantoj, ĉeestis 33 homoj, el kiuj 15 infanoj 3- ĝis 15-jaraj. Dum la semajnfino aldoniĝis 10 personoj por la somera universitato de EDE.

Tiuj ĉi someraj staĝoj kunvenigis entute 152 personojn.

La aŭtuna mult-aktiveca renkontiĝo kunvenigis 29 ĉeestantojn de la 19-a ĝis la 25-a de oktobro. Jannick Huet kaj Bert Schumann staĝestris, Elisabeth Le Dru instruis en E-kurso, Maja Mériaux estris ĥorkantadon, Nathalie Dubrulle gvidis aktivecon arto kaj naturo. Olivier Buisson gvidis esperantlingvan migradon.

La 9-an staĝon AŬTUNE, de la 25-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro, partoprenis 25 ĉeestantoj, inter kiuj 5 infanoj kaj junuloj. Staĝestris Bert Schumann, Esperanton instruis Tim Morley, ĝardenumis Nathalie Rigault. Dum AŬTUNE, la 27-an kaj 29-an de oktobro okazis AMO-68, seminario de Aktivula Maturigo kun prelegoj pri "La rolo de Eo-Centroj" en la mondo.

Sume, dum la 41 tagoj de tiuj staĝoj en la jaro 2020, venis 205 homoj (275 en 2019, 279 en 2018, 278 en 2017, 254 en 2016, 242 en 2015, 204 en 2014) por 2 725 manĝoj kaj 1 204 tranoktoj.

Ni memorigas, ke la prezoj de la staĝoj ne plialtiĝis de dek jaroj kaj ke duon-tarifo validas por infanoj, junuloj, senlaboruloj kaj personoj kun malaltaj vivrimedoj, celante instigi esperantistojn al vizitado. Bonvolu informi pri tio viajn konatojn.

## **Ludonoj**

Jam la okan jaron la Kulturdomo financas sin per ludonoj al privatuloj. Entute kontraktiĝis 28 ludonoj, sed realiĝis nur 11. Pro pro la sansituacio nuliĝis multaj luadoj. Kelkaj luantoj petis repagon, kelkaj ŝovis la ludatojn al posta periodo, pluraj kazoj ankoraŭ ne solviĝis. Tial ne eblas klare kalkuli la efektivan gajnon el tiuj luoj.

## **Konstrulaboroj kaj prizorgado de la bieno**

Dum 130 tagoj ni daŭrigis la plej diversajn laborojn, ankaŭ dum la periodoj de trudizoliĝo. Fakte René Jelenc kaj Bert Schumann ĉeestis dum multaj labortagoj, luadoj kaj staĝoj.

La plej grava el tiuj ĉi laboroj, kiun ĉefe René Jelenc realigas jam la duan jaron, estas la konstruado de la ĉambro alirebla per rulseĝo en la antaŭa bindejo. La plej temporaba laboro estas la senveprigo de la poplejoj, arbarvojoj kaj legomejo, la forigo de invademaj bambuoj ĉe la baseno kaj de laŭroj en la arbaroj. La plej bela laboro estas la florbedoj kaj natur-artaĵoj. La plej utila laboro en la kastelo estas la protekto de la pargetoj de la salono kaj oficejo per dura oleo.

Kiel daŭrigon de la plej farendaj riparoj, tegmentisto komplete renovigis la tegmenton de la orienta (maldekstra) kromdomo, novigis la tegmentfenestrojn kaj varmkonservilojn, kaj forigis la neutilajn fumtubojn. En la Trinkejo oni instalas belan fornon, kiu bone varmigas la Trinkejon kaj la supran ĉambron 35 kaj ebligas bruligi lignorestaĵojn el nia tereno.

Nia arbohakisto plu faligas antaŭelektitajn arbojn kaj aĉetas ilian brullignon. Arbotajlisto reduktis branĉojn de la katalpo ĉe la orienta kromdomo kaj kurace tajlis nian majeston kverkon.

Ni danku al René Jelenc, Yves Couturier, Bert Schumann, Frédéric Lauriol, Jannick Huet, Catherine Kremer, Brigitte Ardon, Claudie & Dominique Bureau, Nathalie Dubrulle, Emmanuel Morin, Ugo de Maubeuge, Thierry Charles, Dominique Baron, Alain Descarpentries kiuj partoprenis tiujn ĉi diversajn semajnfinojn kaj volontulajn laborojn en 2020.

## **Komerca evoluigo**

Sekve de esploro farita danke al la 'Loka Progresiga Aranĝo' (DLA), ni daŭrigas serĉadon de klientaro por altigi la enspezojn danke al pli multa okupo de la kastelo, ĉefe ekster la semajnfinoj kun luadoj. Pierre Soubourou, Jannick Huet kaj Catherine Kremer do konsistigis laborteamon al kiu aliĝis poste staĝantoj.

Inter aŭgusto 2020 kaj februaro 2021, Catherine Kremer laboris kiel komisiito por krei proponojn de restadoj, serĉi klientaron kaj direkti staĝantojn kies laboro estas serĉi klientojn.

Marine S., studentino en Angers kiel "Bakalaŭro pri Turismo", iĝis dungita de la Kulturdomo por serĉado de klientaro, unue de 2020-okt-19 ĝis 2020-dec-18 per kontrakto subskribita kun ŝia lernejo, poste de 2021-jan-01 ĝis 2021-aŭg-28 per kontrakto pri metilernado kun ŝtata helpo reduktanta la koston. Danke al ŝia laboro, pluraj klientoj pretas lui la kastelon regule dum la jaro post la pandemio.

## 5) Financa raporto

En ĉi tiu jaro 2020, la kutimaj enspezoj de la Kulturdomo forte malpliigis: staĝoj 28 200 € (-40 %) kaj luadoj: 22 281 € (-68 %). Trarigardo de la kontoj montras, ke ĉi tiu enspezo ebligis kompensi la devigajn kostojn. Donacoj forte altiĝis al 14 854 € (+350 %).

La ŝtata helpo por kompensi la perdon de aktivaĵoj sumiĝis je 26 000 €, per kio ni atingas suman enspezon de 94 857 € kaj profiton de 37 232 €.

Dua parto de rekonstruado de la tegmentoj finiĝis kaj kostis: 72 276 € por la orienta kromdomo. Ĉiujaraj prizorgaj laboroj de la kastela tegmento aldoniĝis, kostante 2 700 €.

La societa kapitalo malpliigis pri la A-partoj: – 480 € ĝis 13 632 € kaj pliigis pri la B-partoj: +9 200 € ĝis 110 600 €.

Pri la disponeblaĵoj, je la 31a de decembro 2020, ni havas entute 134 922 €, el kio 9 688 € en ĝirkontoj, 107 627 € en ŝparkontoj kaj 17 444 € kiel societaj partoj de la Popol-Banko. Antaŭpago de 10 694 € jam estis pagita al la tegmentista firmao por la renovigo de la tegmento de la kuireja alo kaj kampadista duŝejo en 2021.

*La financaj tabeloj (bilanco, spezkonto, buĝeto) ne estas senditaj kun la nuna dokumento, sed publikigitaj en nia retejo*

## 6) Imputo de la profito 2020

Profito neta post imposto:	37 232,20 €
Imputo al la laŭleĝa rezervo 15 %:	5 584,83 €
Pago de interezoj por societaj partoj B:	1 086,20 €
Dividendo al societanoj: nenio	
Altigo de kapitalo: nenio	
Fonduso por evoluigo:	30 561,17 €

## 7) Buĝeto 2021

Pro la nuna necerteco ligita al la sansituacio, ne eblas proponi buĝeton 2021, sed on povas konjekti situacion similan al 2020. Ni ricevis ŝtatan monhelpon por kompensi nian perdon de enspezoj.

## 10) Venonta programo 2021

- 2021-maj-25/29 : Ĥora (korusa) renkonto de *Interkant*
- 2021-jul-05/09: 2-a Verda Naturisma Semajno post festivalo de FestiNATUR'
- 2021-jul-12/22: 7-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (en la franca)
- 2021-jul-23/aŭg-02: 5-a Maratona Esperanto-kurso
- 2021-jul-25/31: 33-a Internacia E-Konferenco post OSIEK
- 2021-aŭg-02/12: 11-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj
- 2021-okt-20/24: Ĥora (korusa) renkonto de *Interkant* kaj migrado kun lingva bano
- 2021-okt-24/nov-01: 10a staĝo AŬTUNE

Vi povas informiĝi pri niaj staĝoj kaj aliĝi diversmaniere:

- en nia retejo ĉe: [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo) kaj: [gresillon.org/aligho](http://gresillon.org/aligho)
- rete al: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org) aŭ [gresillon@gmail.com](mailto:gresillon@gmail.com)
- telefone al: +33 2 41 89 10 34 (aŭtomata respondilo) aŭ +33 6 51 24 24 23 (Bert)
- poŝte al la sekretario: MCE / Schumann, 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné

La Kulturdomo bezonas vian helpon! Dankon pro aliĝo kaj aligo de viaj amikoj..

## 11) Nunaj laboroj

Post la necesejo por rulseĝuloj, la ĉambro alirebla per rulseĝoj estas nun preta, kaj nia programo de konstrulaboroj devos daŭri dum la postaj jaroj por plibonigi la komforton de la kastelo. Precipe por renovigo de la tegmento de la kastelo, kio kostas entute 400 000 € kaj ŝajnis nerealigebla projekto antaŭ dek jaroj, kvankam necesa. Ni jam realigis preskaŭ duonon, kaj danke al propono de pruntado al kiu pluraj dekoj inter vi jam respondis favore (projekto tegmento), ni disponos sufiĉe por fini tiun renovigon ĝis 2023. Ni bilancos la konstrulaborojn nunajn kaj venontajn, konsiderante la prioritatojn, kiujn vi sugestos al ni.

## **12) Komerca evoluigo**

La laboro de klientoserĉado farita de Catherine Kremer kun la helpo de staĝanto Marine S. kaj sub la gvidado de Pierre Soubourou kaj Jannick Huet, kun la celo atingi novan klientaron, kiu luprenu la kastelon dum la labortagoj kaj ne dum la semajnfinoj, malrapide fruktodonas pro la pandemio, sed promesplenajn rezultojn oni jam atingis, tiel ke sekve de la kontrakto de Marine, kiu finiĝas en aŭgusto 2021, ni decidis varbi, danke al ŝtata monhelpo, du novajn metilernantojn, studentoj pri turismo, dum la lerneja jaro 2021/2022. Ni prezentos bilancon pri la esperataj rezultoj je mallonga kaj mezlonga tempo de ĉi tiu komerca evoluigo, kaj aŭskultos viajn komentojn.

## **13) Prizorgado kaj plibeligo de la parko**

De sarkado al la Natur-Arto de Nathalie Rigault, pluraj volontuloj de la naturkomisiono regule laboras por prizorgi kaj plibeligi la bienon. Herbofalĉadon, arbojn kaj arbar-administradon, eliminon de la bambuoj, sed ankaŭ plantadon de floroj, arboj ... meritas nian atenton kaj iom el nia buĝeto. Sugestoj estas bonvenaj. Catherine Kremer, ekzemple, proponas reuzadi la malnovajn forcejojn.

## **14) Peto de najbaro**

Nia najbaro Jean-Pierre Rousseau sciigis, per letero (kiun ni transsendos al tiuj, kiuj petos ĝin), sian deziron aĉeti la vojon apartenantan al ni kaj limantan lian posedaĵon. La Komitato ne favoras tion, sed necesos pli esplori la peton kaj se necese modifi la interkonsenton atingitan antaŭ kelkaj jaroj pri ĉi tiu vojo, por konservi bonajn najbarecajn rilatojn kun s-ro Rousseau. Pro teĥnikaj kialoj, la dumseancaj voĉdonoj ne eblis dum ĉi tiu jarkunveno, sed ni atentis viajn komentojn pri ĉi tiu afero.

## KONEKTIĜO AL LA RETA KUNSIDO

Vi povos konektiĝi al la reta kunsido per tiu ĉi ligilo:

<https://zoom.us/j/99552418250?pwd=eTFxQ2kzZ2g0eFhBRXV2RU5rNy9udz09>

Se necesos pasvorto, tiu ĉi estas: **zamenhof** tute minuskle.

Se vi ne havos retaliron, vi povos atingi la kunsidon telefone: el Francio, ĉe la numero: **01 7037 2246**

(ekster Francujo: depende de la lando, trovu la taŭĝanan telefonnumeron ĉe: <https://zoom.us/u/a2QLMaK8x>)

kaj poste tajpante la identigilon de la kunveno: **995 5241 8250**

(Por tiuj, kiuj telefonos, atentu ke la administranto povos malŝalti vian mikrofonon okaze de tro da bruo, do sciu ke vi mem povos ree ŝalti kaj malŝalti vian mikrofonon per premo al \*6. Eblos ankaŭ "mansigni" al la administranto de la kunveno per \*9, kio aperigos indikon videblan de la administranto).

## VOĈDONO KAJ VOĈDONILO

La statutaj voĉdonoj (raportoj, kvitigo...) okazos precipe per reta baloto en la retejo **balotilo.org**, antaŭ kaj dum la kunveno. Vi povos modifi vian voĉdonon dum la seanco ĝis la fermo de la voĉdono ĉirkaŭ la 16a horo. Pro teknikaj kialoj, ne okazos aliaj voĉdonoj dum la seanco. Ĉiu societano (havanta apartan retadreson) ricevos de la retejo balotilo.org mesaĝon invitantan al voĉdonado per individua ligilo.

Societano, kiu ne havas retadreson, ne povas aŭ ne deziras voĉdoni per la retejo balotilo.org, povas voĉdoni sendante (per papera aŭ reta poŝto) la ĉi-subajn voĉdonilon, kondiĉe ke ĝi alvenos plej malfrue vendredon, la 30an de aprilo. Via papera voĉdonilo estos enkalkulita nur se vi ne voĉdonis ankaŭ pere de balotilo.org.

Enmetu vian voĉdonilon en koverton kaj sendu ĝin kun via nomo kaj la vorto "VOĈDONO", al jena adreso:

M. François LO JACOMO  
72 quai de la Loire  
75019 PARIS  
France

aŭ retmesaĝe al: francois@lojacomu.eu.

Jarkunsido de la Kulturdomo de Esperanto, kastelo Greziljono, la 1-an de majo 2021

## VOĈDONILO.

Aprobo de la agadraporto 2020:  POR  KONTRAŬ  SINDETENO

Aprobo de la financa raporto 2020 kaj  
Aprobo de la kontoj 2020:  POR  KONTRAŬ  SINDETENO

Imputo de la profito 2020:  POR  KONTRAŬ  SINDETENO

Kvitigo al la Komitato:  POR  KONTRAŬ  SINDETENO